BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

CGC Nº
00406 504/0001-06

# Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA
Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA
Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

JULHO/1982 BOLETIM INFORMATIVO Nº 71

## L I B E R A  U N I V E R S I T A T O

Ekde la dua semestro de la kuranta jaro, homo kiu ne havas tempon aŭ oportunon vizitadi universitaton, povas nun studi per korespondado. La Universitato de Brazilio (UnB) proponas al la publiko lernoprogramon je distanco, nomatan "Libera Universitato". Gvidotaj de naciaj kaj internaciaj profesoroj, la kursoj, kun sesmonata tempodaŭro, konsistos el tekstoj, demandaro, ekzercoj, komplementa bibliografio kaj studoj diversaj. Unu fojon monate, oni taksos la lernoevoluon kaj en la kursfino estos prezentitaj du disertaĵoj, surbaze de antaŭelektitaj temoj. Laŭ la progreso de la kursanoj, ili ricevos atestilon de "universitata klerigkurso".

La ideo pri kreo de tiaj kursoj naskiĝis en Britujo, en 1968, kiam lordo Perry of Walton fondis la Liberan Universitaton (Open University), kiu kunigas nuntempe 30% de la britaj universitatanoj. La iniciato bone sukcesis, kaj tuj iĝis ekzemplo por aliaj landoj, kiel Usono kaj Ĉina Popola Respubliko.

Por la organizado de simila universitato en nia lando, la UnB ricevis la kunlaboron de lordo Walton. Laŭ profesoro Tarcísio Meira César, kunordiganto de la kursoj, la universitato celas "starigi, kun amplekso tutlanda, kulturan programon, el kiel eble plej alta nivelo, kiu disponigos al la publiko instrumaterialon altkvalitan kaj malmultekostan por ampleksaj sektoroj de la brazila socio".

Komence, estas antaŭviditaj kursoj pri "Enkonduko al Politika Scienco", "Internaciaj Rilatoj" kaj "Enkonduko al la Brazila Politika Penso". Tamen, por 1983, estos je dispono de la interesatoj 20 novaj kursoj, kiel Ekologio, Historio de la Kalkulo, Genetiko, Teorio Politika, Poezi aĵoj el la 20a Jarcento kaj Enkonduko al la Antropologio, inter aliaj.

La interesatoj povos skribi al "Programa de Ensino à Distância, do Decanato de Extensão da UnB (Campus Universitário, Asa Norte, CEP 70910, Brasília-DF), petante aliĝilon kaj informojn pri la nuna programo kaj pri la estontaj kursoj.

**El la Revuo "BIP" - Banco do Brasil S.A., junio 1982, n-ro 102, tradukis nia Redakcio**

## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Honora Prezidanto

Francisco de Souza Almada, Rua Galeão Carvalhal, 31, Ap. 73, BR 11100 - Santos - SP.

Estraro

**Prezidanto:** Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP

**Vicprezidanto:** Nelson P. de Souza Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

**Kasisto:** José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 01 - Cj. 08, casa 15 BR 71500 - Brasília - DF

**Sekretario:** F-ino Lêda da Silva Gama, SOS 306-A 101,BR 70353 - Brasília-DF

**Kulturaj Aferoj:** Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

**Informa Bulteno**

Oficiala organo planita por monata apero.

Dissendo senpaga

RESPONDECAJ DIREKTOROJ: Carlos A. S. Cunha, Nelson P. de Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

## LIBROJ INVADAS BRAZILION

Dank' al iniciato de federacia deputito Freitas Nobre, okazis en la fino de Majo la fondo de aparta Esperanto-sekcio en la biblioteko de la Ĉambro de Deputitoj. Por la plena sukceso de la iniciato la esperantistoj bonvolu sendi donace taŭgajn librojn al la nova Esperanto-sekcio, adresante ilin al ties respondeculo:

D-ro Aristeu Gonçalves Melo
Centro de Documentação e Informação
Biblioteca da Câmara dos Deputados
70.000 - BRASÍLIA (DF)

## MALGRANDA UEA EN ŜTATO BAHIA

**Dum la 18a Seminario de Esperanto,** okazinta en Uberlândia-MG, ni havis la plezuron konatiĝi kun D-ro Isao Noguti, José Saraiva Matos kaj Vivaldina Caymmi, tri sindonaj esperantistoj al kiuj Bahia Esperanto-Asocio certe ŝuldas sian nunan pozicion kiel unu el la plej aktivaj E-organizaĵoj en nia lando.

Multaj personoj ekster Bahia verŝajne ne konas la seriozan, fruktodonan kaj altnivelan agadon de tiu Asocio, kiu estas fakte vera Esperanto-potenco en sia ŝtato.

Laŭ informo de Vivaldina Caymmi, oni tie planis la dissemadon de E-kursoj en ĉiu komunumo strategie situanta en la ŝtato, samtempe kun la nomumo de reprezentanto rekte ligita al la Asocio en Salvador. Tiamaniere, la movado pli kaj pli ekfloras kaj vigliĝas en pluraj regionoj, kio ja konsistigas grandan ĉenon de aktivaj Esperanto-nukleoj obeantaj al la orientado fare de ABE, kiu ŝajnas malgranda UEA reganta la movadon en Bahia.

Tiu meritinda laborplano ankaŭ antaŭvidas intensan agadon en Salvador, pere de folkloraj aŭ tradiciaj festoj (laŭ la sukcesplena junia festo okazinta en 19-06-82); pere de literaturaj konkursoj, unu el ili realigota en Aŭgusto ĉi-jare; kaj pere de prelegoj kaj paroladoj pri Zamenhof kaj Internacia Lingvo, dank' al la persona iniciato de diversaj kleraj esperantistoj, inter kiuj ni devas elstarigi profesoron Ruy Guilherme. Krome, ABE organizas diversajn E-kursojn en la sep lernoĉambro de sia komforta sidejo - Avenuo 7 de Setembro n-ro 109 - kiun la registaro disponigas al la Asocio, kune kun tri oficistoj dungitaj de la ŝtato.

Pro lo grandioza kontribuo de ABE al la brazila E-movado, ni tie ĉi prezentas varman gratulon al ĝia prezidanto, D-ro Isao Noguti kaj al la ceteraj kunestraranoj, kun espero, ke ilia laboro fariĝu imitinda ekzemplo por ĉiu E-organizaĵo funkcianta en nia lando.

Carlos A. S. Cunha



## TRA LA MONDO

• La ĉiam alloga "Revista Portuguesa de Esperanto" (Rua João Chagas, AM - 2795 Linda a Velha - Portugalio) faras diversajn aludojn al brazilaj aferoj. Portugallingvan prelegon de Prof. Alves de Moura, sub la titolo "Esperanto Segunda Língua Materna" disdonas Sociedade de Língua Portuguesa - Rua de S. José, 41-2º-Lisboa).

• EGLI - Esp-ista Go-Ligo Internacia (2-26-2 Kozima, Tyôhu - Tokio 182 - Japanio) en kontakto kun Go-Grupo en Brazilio kaj Associação Brasileira de Go (Rua dos Estudantes, 285 - Liberdade - 01505 São Paulo-SP) anoncas, ke estas aĉeteblaj Go-tabuloj fabrikitaj de la brazila firmao GROW Produtos para Recreações Ltda. (Rua Natal, 526 - São Paulo-SP).

• ĈIAM PRETA, oficiala organo de Skolta E-Ligo (Postbus 433 - 1500 EK Zaandam - Nederlando) informas pri multaj novaĵoj. En Brazilo la reprezentanto estas: D-ro ELUIZIO BUENO - C. Postal 234 - 18100 Sorocaba-SP).

• VENEZUELA STELO (Apartado 47675 - Caracas 1041A - Venezuelo) aperas regule kun interesaj legaĵoj: Jarabono 5 irpk. De la 10ª/12ª/decembro/ 1982 okazos la Unua Esp-ista Renkontiĝo en Venezuelo.

• TAMTAMO (B.P. 713 - Tesaloniko - Grekio) estas tre interesa monata revuo pri bibliaj kaj etikaj aferoj.

• MONDANISTA GAZETOFICEJO (15 rue Victor Duruy, F-75015 Paris-Francio) organizas Kongreson de la Popoloj pri malarmado, rajtoj de minoritatoj k.a. kaj alvokas avangardulojn el la tuta mondo.

• MEDICINA HEROLDO - D-roj Carlos Lima Melo, Paulo Sérgio Viana, Ezequias Alves kaj Hélio F. Aderne konsistigas redaktan komitaton de faka revuo Medicina Heroldo, oficiala organo de Brazila Esperantista Kuracista Rondo, kun sidejo je Strato Domingos Grosso, 53 - Venda Nova- 30.000, Belo Horizonte-MG. La revuo estas legata en 30 landoj, kaj en la speciala numero de marto aperigas - inter aliaj - longan ilustritan artikolon pri denta kario, verkita de D-ro Roberto V. Resende, el Brazilio.

## DEZIRAS KORESPONDI

☆ STANISLAV DEBSKI (ul. Glowna 55 - 97-122 Rozyca - Pollando) - 18j. lernanto; pri ĉiuj temoj.

☆ STANISLAW MANDRAK (ul. Kormoranów 39/16 - 44-114 Gliwice - Pollando) - 33j. inĝeniero; pri ĉiuj temoj. kolektas E-materialon.

☆ RAPPA STAVAMIRO (Gwardii Ludovej 29/8 - 22-400 Zamosc - Pollando) 22j. laboristo en konstruindustrio; pri sporto: bokso kaj futbalo.

☆ PATRICK PETIOT (C. Postal 96920 - 28699 Nova Frigurgo-RJ - Brazilo) - 14j.; kun gejunuloj ĉefe en Usono, Japanio, Britio, Tunizio kaj Maroko.

☆ JANUSZ J. OSBRZYMEK (Skr. Poczt. 54 - 30-964 Krakow 42 - Pollando) 26j.; pri libroj, filmoj, historio, geografio, bildkartoj.

☆ LOTHAR KORNER (Bahanhofstr. 2 - DDR-1330 Schewedt - ORIENTA GERMANIO) 30j.; pri bildkartoj, fervojaj kaj flugaj horaroj.

☆ JOACHIM GROSCHEL (E. Thalmann Str. 62 - 6600 Greiz/DDR - Orienta Germani) - 42j. fervojisto; pri filatelio kaj Esperanto.

☆ TIMAR GÁBOR (Hungaria 39 - H-1192 Budapest - Hungario) - 30j. instruisto; pri angla kaj geografio.



# BRASILAJ NOVAĴOJ

★ BRAZILAJ ROMANOJ EN ESPERANTO - Ĵus aperis du famaj verjoj: I) "INOCÊNCIA" - aŭtoro Visconde de Taunay; tradukis Generalo Padua (forpasinta lastjare); eldonis Fonto (C. Postal 49 - 89800 Chapecó-SC); II) "A BAGACEIRA" - aŭtoro José Américo; trudikis Prof. Geraldo Mattos; eldonis Kultura Kooperativo (Av. 13 de Maio, 47 sobreloja 208 20031 Rio de Janeiro-RJ).

## ALAGOAS

★ En la ĉefurbo Maceió estas intensa agado de Associação Alagoana de Esperanto (Av. Moreira Lima, 108/101 - C. Postal 334 - 57000 Maceió-AL), kiu aperigas monatan bultenon "Klariono" kaj faris peton al la Ŝtata Sekretariejo pri Edukado por enkonduki Esperanton en la mezgradajn lernejojn. Baldaŭ aperos "La Biblio en Versoj" verkita de s-ano Francisco Alves da Mata.

## AMAZONAS

★ Gvidata de Prof. Sady M. Silva, okazas en Manaus kurso ĉe Federação Espírita Amazonense (Rua José Clemente, 410 - 69000 Manaus-AM).

## BAHIA

★ Associação Bahiana de Esperanto (Av. 7 de Setembro, 109 - 40000 Salvador-BA) okazigas plurajn kursojn kaj ĉiusabate kunvenas por diskuti pri Instruado, Arto, Kulturo k.a.

## CEARÁ

★ Ĉe la Federacia Universitato, en Fortaleza, ekestas "Nucleo de Estudos de Medicina Alternativa", kiu en oktobro okazigos debatojn kaj prelegojn pri diversaj temoj, inkluzive de Esperanto. Sugestojn oni sendu al: GILBERTO FILHO - Rua José Marrocos, 415 - 60000 Fortaleza-CE).

## FEDERACIA DISTRIKTO

★ LABORGRUPO ANTAŬEN (C. Postal 07-1055 - 70000 Brasília-DF) ricevis donace 400 ekzemplerojn de "Ha, se mi scius ..." por senpaga disdono. Tiun donacon faris LEMBRA - eldonejo-librejo de Sanatório Espírita de Brasilia (C. Postal 07-0888 - 70000 Brasilia-DF), kiu estas distribuanto de spiritismaj libroj el ĉiuj eldonejoj, inkluzive de esperantaj eldonaĵoj.

## MINAS GERAIS

★ Funkcias E-Fako ĉe União Espírita Mineira (R. Guaranis, 315 - 30000 Belo Horizonte-MG), kiu okazigas kursojn gvidatajn de s-anoj Said P. Albuquerque kaj Paulo R. Santos.

## PARANÁ

★ Paraná Esp. - Asocio havas novan Estraron, kies prezidanto estas s-ano Itacir Luchtemberg. Belajn presaĵojn kaj interesan programon oni preparis por la 2ª Sudbrazila Renkontiĝo, okazonta en Kuritibo de la 3ª ĝis la 5ª de sept. 1982, kies patrono estas la Rektoro de la Federacia Universitato.

## RIO GRANDE DO NORTE

★ Gratulon al "Informativo", oficiala organo de Associação Potiguar de Esperanto (C. Postal 291 - 59000 Natal-RN), kiu enhavas riĉan materialon pri la loka movado.

## RIO DE JANEIRO

★ Aperis n-ro 6 de la esperanta "SEI - SPIRITISMA ESPERANTO-INFORMILO (Rua dos Inválidos, 34 - 20231 Rio de Janeiro-RJ), kiun oni disdonas senpage.

★ D-ro Helio F. Aderne, konata kuracisto esp-isto el Belo Horizonte faris prelegon cê la sidejo de Brazila E-Ligo, kiun patronis ankaŭ Associação Esperantista de Rio de Janeiro, kies prezidanto, Gen. Chersoneso Galvão, ankaŭ estas kuracisto.

## SÃO PAULO

★ Grupo el la Kurso de Ĵurnalismo de Fakultato "Cásper Líbero" preparas programon "Sociedade Alternativa" elsendotan de Radio Gazeta (São Paulo) kaj petas informojn pri Esperanto. Skribu al: CARLOS A.P. TAVARES - C. Postal 46015 - Ag. Saude - 04045 São Paulo-SP.

★ En la urbo Salto-SP ĵus finiĝis kurso gvidata de s-ano Agostinho Rodrigues kun apogo de lokaj aŭtoritatoj kaj de la gazetoj "Taperá" kaj "Trabalhador". Jam fondiĝis loka societo, kies prezidanto estas s-ano Agostinho. Ricevis ateston pri la konkludo de la kurso jenaj personoj: An-

tonio B. Gonzaga, Francisco André P. Canavezzi, Floreal Hernandez Barão, Ettore Liberalesso, Virgínia S. Liberalesso, Desdemona I. Alberto, Judite Polo, Marta V. Rossi kaj la instruistoj O. Della Páscoa, Luzia A. R. Castellani, Maria Damiem Pacheco, Maria R. de Quadros kaj Natalina R. Zanuni.

★ Daŭre apogas Esperanton la urbestro de Jundiaí-SP, kie okazis nova elementa kurso gvidita de Prof. Roberto Gomes de Freitas. La kursfinan inviton oni faris en oficiala papero de la Komunumo, subskribe de la Sekretario por Edukado, Kulturo, Sportoj kaj Turismo, D-ro Duilio Lenhaioli.

★ Gravan apogon donas Rotary kaj la Urbestro al E-kursoj okazantaj en la urbo Promissão-SP, gvidataj de Prof. Valdemir Moreira kaj organizataj de la loka societo, kies prezidanto, s-ano Lair Moreira, eĉ sukcesis venigi per komunuma aŭtobuso gelernantojn el la apuda urba Avanhandava

★ En la urbo Votuporanga-SP Prof. Valdemir Moreira gvidis kursojn, el kiuj jam organiziĝas loka grupo.

★ En Caçapava-SP nia laborema Delegito, Majoro Silva Velho, en la 9ª de julio (festo de la porkonstitucia revolucio) ricevis 3 ordenojn de ŝtataj instancoj.

★ En Piracicaba-SP, ĉe Kultura Centro "Cristóvão Colombo" okazas E-kurso gvidata de junulo Marcos Zlotovich.

★ En Pindamonhangaba-SP, s-ro Morel Ribeiro dos Santos gvidas kurson ĉe Spiritisma Institucio "Paulo do Amaral".

★ Fondiĝis Grupo Esperantista do Oeste Paulista, kiu kunvenas ĉe: Rua Visc. Ouro Preto, 2499F - 15100 São José do Rio Preto-SP.

## ESPERANTISTAJ SPRITAĴOJ

★ Iu brazila esperantisto, ironte al la Renkontiĝo en San José dos Campos - ĉe la tiel nomata "Valo de Paraibo" - telegrafis al amiko: "Dum kelkaj tagoj mi estos ĉe valo".

★ En Brazilo estas geedzoj (mi ne diras kie, nek la nomojn!), kiuj havas tre interesan kutimon koncerne la gefilojn: ŝi parolas al ili portugale, sed li alparolas ilin nur Esperante. Kompreneble! Li estas eksterlandano . . . li estas portugalo!

**Verkis: Pirarbo**

## EL LA GAZETARO



● ILHÉUS NOTÍCIAS (Rua Joana Angelica, 100 - 45600 Ilhéus-BA) faras grandan bruon per intervjuo de s-ano Eleus L. Sá.

● DIÁRIO DE TAUBATÉ aperigis grandan raportaĵon pri la movado en la tuta ŝtato San-Paŭlo.

● DIÁRIO POPULAR de la ĉefurbo S. Paulo publikigas rubrikon "Notícias Esperantistas".

● DIÁRIO DE NATAL publikigis interesan artikolon pri la enkonduko de Esp. en UFRN (ŝtata universitato) fare de Prof. Waldson J. B. Pinheiro.

● DIÁRIO DA TARDE, el Belo Horizonte-MG, en la 24/7/82 publikigis interesan artikolon de s-ano D-ro José Roiz pri Esp-instruado en lernejoj.

● JUNDIAÍ HOJE aperigis grandan noton pri la XV Seminario okazinta en Uberlândia.

● O TRABALHADOR (el Salto-SP) ofte raportas pri E-novaĵoj kaj elstare informis pri la starigo de E-Fako ĉe la Biblioteko de la Ĉambro de Deputitoj.

● NOVA ERA (C. Postal 65 - 14400 Franca-SP) publikigas rubrikon "Esperanto em Foco", kium redaktas s-ano Silva Velho.

● O TRIÂNGULO, de Uberlândia-MG, publikigis grandan artikolon "Um Decreto Oportuno", de s-ano Wutke, pri la atingoj de Esp. ĉe la Ĉambro de Deputitoj.

● O JORNAL (Av. Pedro de Toledo, 705 - 16370 Promissão-SP) raportas pri la loka movado.

● CORREIO DE UBERLÂNDIA - akompanis la okazaĵojn de la XV Seminario tie okazinta.

● O ESPÍRITA FLUMINENSE, organo de "Federação Espírita do Estado do Rio de Janeiro", en sia n-ro 205, aperigas artikolon pri asociaj rajtoj kaj interna vivo de Niterói Esperanto-Klubo, verkitan de ties prezidanto, D-ro Joaquim do Couto.

## LA 67-A UK DE ESPERANTO

Raportis Maria Almada

Ĉifoje kunvenis en Antverpeno, Belgio, de la 24-a ĝis la 31-a de julio.

Ĝia alta protektanto estis Lia Reĝa Moŝto Baldueno de Belgio.

La 25-an de julio, matene, okazis la solena malfermo de la evento, en la granda salono de la Reĝa Asocio por Zoologio.

Alparolis la ĉeestantojn la oficialaj reprezentantoj de 14 landoj. La kurtan salutparoladon de la reprezentanto de la brazila Ambasado tradukis s-ino Neima Adôrno. La ĝenerala konsulo de Usono en Belgio parolis en Esperanto, lingvo kiun li lernis antaŭ 25 jaroj en Ĉikago.

En la gravaj gazetoj, belgaj, francaj kaj nederlandaj aperis multaj artikoloj pri la UK kaj Esperanto. Du radio-stacioj elsendis plurajn sciigojn kaj intervjuojn ĉiutage.

Aliĝis 1999 personoj el 51 landoj. La unuan fojon aperis sep hindaj esperantistoj ĉe la UK kaj ĉirkaŭ 20 el Sovetunio. Brazilon reprezentis pli ol dek personoj el diversaj ŝtatoj.

Dum la solena malfermo parolis s-ro MUSTAPHA MASMOUDI, konsilanto ĉe la ministro; eksministro pri informado; eksambasadoro de Tunizio ĉe Unesko. Li prezentis la temon: "LA LINGVAJ MALHELPOJ EN LA RILATO KUN LA NOVA MONDSKALA ORDO DE INFORMADO KAJ KOMUNIKADO". Li interalie diris: "En nia tempo neniu povas neadi la rolon de la lingvoj kiel iloj de komunikado kaj instrumentoj de evoluado, kaj malpli ankoraŭ ilian kontribuon en la certigo de la kultura identeco kaj de la valoroj de la diversaj societoj".

Aparta kaj agrabla surprizo estis la ĉijara Kongresa Kuriero, kiu aperis en formato de HEROLDO, du paĝa, bonege presita kaj ĝenerale plaĉa. Ĝi amplekse informis pri la kongresa laboro kaj aperigis mallongajn sciigojn pri la mondokazintaĵoj.

La prezidanto Maertens akceptis en la kongresejo du germanajn parlamentanojn de la Eŭropa Parlamento. Ili ĉeestis publikan kunsidon de Internacia Scienca Asocio de Esperanto - ISAE kaj interesiĝis pri la laboroj de UK.

En ĝeneralaj kunvenoj estis pritraktita la ĉijara kongresa temo: "GÊNERALAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO". Aŭdiĝis plendoj, ke la movado tre malmulte atentas pri la mezaĝa generacio, do homoj inter 26 kaj 50 jaraĝaj. Nome, ili mankas en nia movado. La kaŭzo, ŝajnas esti ke la mezaĝuloj pritraktas sian karieron, formas familion kaj ne havas tempon por Esperanto, kiu ankoraŭ ne donas viveblecon.

En la 67-a UK mankis la junularo, sed bone sin prezentis la Infankongreseto, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 30 geetuloj.

Estis akceptita de UEA, kiel ĝia fakorganizaĵo la Universala Artista Ligo de Esperantistoj UALE -, kiun reprezentis S-rino Maria Almada, kiel ĝia vicprezidanto.

La 68-a Universala Kongreso de Esperanto okazos venontjare en Budapeŝto (Hungario), de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto, 1983. Ĝia temo estos: "ESPERANTO KAJ KOMUNIKADO".

Ĉiuj estas invitataj!

## KAMPANJO POR 250 INDIVIDUAJ MEMBROJ

Alkurante al nia alvoko farita en la lasta Bulteno, aliĝis al BKE, kiel individuaj membroj, la subaj gesamideanoj al kiuj ni prezentas plej koran dankon: Noemi Lara Coutinho (SC), Fiorina Suevo de Souza (DF), Regina Célia Silva de Andrade (RJ), Maria Isabel Botelho Ramos (DF), Jovelina Maia Rodrigues (RJ), Francisco Alves Mata (AL), Carlos Henrique Dionísio (RS), Dayse Silva Miranda (DF), Arlete Costa de Souza (RJ) kaj Nair Ferreira Cunha (SP)

Tute aparte, la Redakcio gratulas la novajn anojn apartenantajn al la "malforta sekso" (ĉu vere?), pro ilia pli forta pruvo de solidareco (8 aliĝoj) ol tiu montrita de la viroj (2) dum la unua monato de nia kampanjo. Viroj, REAGU!

# ĈU VI KAPABLAS RIDI?



**I – La Rabistoj**

*Banditoj haltigas aŭtobuson en dezerta loko kaj elirigas la turistojn. La ĉefo ordonas:*
*– Prirabu la virinojn kaj perfortu la virojn.*
*Iu malaplombe rimarkigas:*
*– Vi verŝajne eraris kaj intencis diri: "Prirabu la virojn kaj . . ."*
*– Ha! ne, protestas juna invertita turisto per akuta voĉo. Dirite estas dirite.*

**II – Edziĝo Kontraŭvola**

*En atendejo de akuŝejo du viroj sidas kun ĉagrena mieno.*
*– Mi estas malbonŝanca, diras la unua. Mia edzino patriniĝas ĝuste dum nia libertempo.*
*– Ha! plendas la dua, kion mi diru pri mia edzino, kiu akuŝas dum la mielmonato?*

**III – Ĉe Kuracisto**

*– Venu tuj, tuj, doktoro! Mia edzino havas apendiciton!*
*– Sensencaĵo! Mi eltranĉis la apendicon de via edzino antaŭ du jaroj, kaj neniam mi aŭdis pri homo, kiu havas duan apendicon.*
*– Sed ĉu neniam vi aŭdis pri viro, kiu havas duan edzinon?*

o-o-o-o-o

*– Mi ne povas kaŝi al vi la fakton, diras la kuracisto, ke vi estas tre malsana homo. Ĉu estas iu, kiun vi deziras vidi antaŭ via morto?*
*– Jes, certe.*
*– Kiun do?*
*– Alian kuraciston!*

**IV – Ebriulo**

*Mi sidis en tramvagono, kiam ebriulo eniris kaj forte piedpremis mian piedon. Ĉagrenite mi eliris al la kondutoro kaj demandis: "Ĉu estas permesite, ke ebriiĝintoj kunveturas?" La viro min esplore rigardis kaj diris poste: "Por diri la veron, tio ne estas permesita. Sed se vi silentos kaj sidos tute trankvile, neniu rimarkos".*

o-o-o-o-o-o

(I k II, el "Kruko kaj Baniko el Bervalo"; III k IV el "Miru, Pensu, Ridu")

# DUA INTERNACIA KONKURSO PRI TROBOJ (KVARVERSOJ) ORGANIZITA DE ESPERANTO-ASOCIO DE SAN-PAŬLO (BRAZILO) OMAĜE AL LA INTERNACIA JARO DE LA MALJUNULOJ

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo okazigas sian Duan Internacian Konkurson pri Troboj (Kvarversoj), laŭ la jena Regularo:

1. Oni konsideras trobo la poemeton kun kvar oksilabaj versoj, en kiu la unua verso rimiĝas kun la tria, kaj la dua kun la kvara. La kvar versoj aŭ estu ĉiuj kvartrokeoj (ĉefakcento sur la tria kaj sepa silaboj), aŭ ĉiuj oksilaboj (ĉefakcento sur la kvara kaj sepa). Ekzemple:

   Por la venk' de Esperanto
   iru ni al la labor'!
   Sur la lipoj - varma kanto,
   firma kredo - en la kor'!

   Ho l Sankta Niĉjo, tardiĝas,
   la poŝta servo al vi . . .
   Multaj leteroj perdiĝas . . .
   Multaj povruloj sen i' . . .
2. La troboj estu ankoraŭ nepublikigitaj.
3. Ĉiu ajn rajtas partopreni la Konkurson, sendepende de aĝo, instrunivelo aŭ antaŭa literatura sperto.
4. Temo: AĜO
5. Genroj de la troboj: filozofia aŭ lirika.
6. Ĉiu konkuranto povas patopreni per maksimume kvin troboj. Ĉiu trobo estu tajpita sur la ekstera antaŭa flanko de malgranda koverto (8cm : 11cm proksimume). En tiun koverton la konkuranto metu paperpecon kun la jenaj personaj informoj: nomo, aĝo, adreso kaj subskribo. Super la trobo estu skribita la temo. La malgranda koverto estu fermita kaj metita en pli grandan koverton sur kiu oni skribu:

   DUA INTERNACIA KONKURSO PRI TROBOJ (KVARVERSOJ)
   ORGANIZITA DE ESPERANTO-ASOCIO DE SAN-PAŬLO (BRAZILO)
   Rua Fáustolo, 124
   05041 - São Paulo - S.P. - BRAZILO

   Oni ne skribu la nomon kaj la adreson de la sendanto.
7. La limdato por la sendo de troboj estas la 27-a de Oktobro 1982. Oni konsideros nur la trobojn alvenintajn ĝis tiu dato.
8. Premioj: Cr$ 5.000,00 por la plej bela trobo, medaloj, libroj kaj diplomoj liverotaj en soleno okazonta la 15-an de Decembro 1982 (entute 5 medaloj, 10 libroj kaj 30 diplomoj). La premioj aljuĝotaj al esperantistoj loĝantaj ekster San-Paŭlo estos senditaj per poŝto.
9. La troboj sendotaj ne estos resenditaj, kaj Esperanto-Asocio de San-Paŭlo rezervas al si la rajton ilin publikigi iam ajn.
10. La rezultato de la Dua Internacia Konkurso pri Troboj estos publikigita en gazetoj de San-Paŭlo kaj esperantaj periodaĵoj.

## LA 15a BRAZILA SEMINÁRIO DE ESPERANTO, KIUN MI VIDIS

Berenice K. Eliot

Spite de la horaro, preskaŭ neniam obeita, la 15a Seminario de Esperanto (Uberlândia-MG, de la 22a ĝis la 25a de Julio 1982), kiun ĉeestis pli malpli 300 personoj, estis la plej grava publika Esperanto-manifestacio okazinta en nia lando, post la 66a Universala Kongreso.

Aparte de la enhavoriĉa programo, en kiu partoprenis elstaraj prelegantoj kiel Geraldo Matos, Syla Chaves, Carlos Lima Melo, Walter Francini, Elvira Fontes, Jair Sales, Ivon Barbosa kaj aliaj, oni nepre reliefigu la personan ĉeeston de D-ro Virgílio Galassi, urbestro de Uberlândia, kaj Patrono de la evento, kiun ĉiujare organizas la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, el Rio de Janeiro.

Sub kultura kaj propaganda vidpunktoj, el la Seminario meritas aplaŭdon la solenan inaŭguron de busto de Zamenhof en iu ĉarma placo de Uberlândia, kaj la lanĉon de la libroj Ideala Nutraĵo, laŭ traduko de Cedilha Neto; A Bagaceira, tradukaĵo de Geraldo Matos kaj "Poesia dos Signos", originale verkita en portugala lingvo de la simpatia poeto kaj advokato, D-ro Jorge Soares das Neves.

Ankaŭ aplaŭdinda estis la teatra prezentado, en Esperanto, de "La Festeno de la Kardinaloj" - majstra tradukaĵo de Geraldo Matos en kiu rolis kun emociiga interpretado Lima Cipolatti, Braz Cosenza kaj Álvaro Fausto de Souza. Malgraŭ kelkaj improvizaĵoj, la ceteraj programeroj enhavantaj kantojn, deklamadon, muzikon kaj sinprezenton de la jam fama grupo Crisol, tre placis la ĉeestantaron.

Tamen, la plej grava epizodo de la Seminario estis la publika kunfratiĝo de BEL, KKE kaj BKE, kies prezidantoj kamaradece akceptis kaj subskribis jenan dokumenton voĉdonitan de la Seminario: "REZOLUCIO - Okaze de la kunfratiĝa kunveno dum la XV Brazila Seminario de Esperanto (MG), la ĉeestantaro decidis starigi komisionon konsistantan el la prezidantoj de la tri naciaj Esperanto-organizoj en Brazilo, kiu-sen jura personeco kaj en-regulaj kunsidoj - celas: a) diskonigi kaj grandskale diskutigi la laborplanon 1983-1987, kiun UEA redaktas por la Centjara Jubileo de Esperanto; b) interŝanĝi ideojn kaj spertojn pri ĝeneralaj movadaj problemoj; c) krei kondiĉojn por komuna agado, inkluzive por financaj rimedoj ebligantaj kaj la jubileajn festojn kaj ĝeneralajn aktivecojn. Uberlândia-MG, la 24an de julio 1982. Por BEL, subskribis Sylla M. Chaves, nuna Prezidanto kaj Fernando José Galvão Marinho, Elektita Prezidanto; por KKE, Braz Cosenza kaj por BKE, Carlos A. S. da Cunha".

Por finkonkludi tiun ĉi senpretendan raporton, necesas rekoni la konscian laboron de la loka esperantistaro, kaj ĉefe tiun de profesorino Shyrlene Soares Campos kaj ŝia edzo, D-ro José de Oliveira Campos, sen kies kompetenteco, prestiĝo kaj sindonemo la Seminario verŝajne ne estus tiel impona kaj sukcesplena kiel fakte ĝi estis, laŭ mia opinio.

## MONDONACOJ POR LA BULTENO

Dank' al la komprenemo kaj financa helpo de niaj asociaj membroj kaj legantoj, tiu ĉi Bulteno povas regule aperi kiel monata heroldo de nia E-movado. La subajn kontribuintojn ni treege dankas, pro iliaj mondonacoj ricevitaj dum majo kaj junio 1982:

| | |
|---|---|
| Barra Mansa Esperanto-Klubo | Cr$ 1.200,00 |
| Cláudio Zimmermann | Cr$ 1.100,00 |
| Francisco de Souza Almada | Cr$ 2.000,00 |
| João Manoel Aguilera Jr. | Cr$ 500,00 |
| Lacordaj Andrade | Cr$ 550,00 |
| Maria José Pontes | Cr$ 300,00 |
| Elvira Fontes | Cr$ 2.000,00 |
| Evandes Barbosa | Cr$ 300,00 |
| Fernanda Morales Aguilera | Cr$ 2.000,00 |
| Francisca Martos | Cr$ 2.000,00 |
| Francisco Carlos C. de Moraes | Cr$ 300,00 |
| Luiz Antonio Loyola | Cr$ 250,00 |
| Manoel Moacir Sisccati | Cr$ 500,00 |
| Mário Ritter Nunes | Cr$ 600,00 |